

Decidoj de la Komitato de ILEI faritaj rete

Ekde la akcepto de la regularo por reta voĉdonado en aprilo 2011 ĝis la konferenco en Kunmingo (julio 2012).

Rilatas al tagorda punkto 6 en Kunmingo.

De plej freŝa ĝis plej malnova.

Voĉdono Komitata 3-2012, okazanta inter la 20a de junio kaj 8a de julio 2012.

3-2012 – propono 1.

La komitato akceptis (per deklarota rezulto) ke anstataŭantoj el Kunmingo rajtas esti loĝantoj de alia lando ol la nomuminta sekcio, se neniuj de tiu teritorio ĉeestas.

3-2012 – propono 2.

La komitato akceptis (per deklarota rezulto) ke unu persono en Kunmingo rajtas esprimi maksimume TRI voĉojn dum la komitataj kunsidoj, kondiĉe ke la anstataŭiga procezo estis korekte plenumita.

Voĉdono Komitata 2-2012, okazinta inter la 6a kaj 20a de marto 2012.

2-2012 – propono 1.

La komitato akceptis (per 34 poraj voĉoj kaj 2 sindetenoj) la ligan buĝeton por 2012, kiel proponite de la kasisto kaj estraro.

La dokumento aperas ĉe www.ilei.info sub Dokumentoj > Financoj.

2-2012 – propono 2.

La komitato akceptis (per 34 poraj voĉoj kaj 2 sindetenoj) la proponatan novan regularon pri la Scienca Komitato de nia oficiala organo, *Internacia Pedagogia Revuo*, kaj taksis la Universitatan Komisionon ellabori suplementan gvidilon.

La dokumento aperas ĉe www.ilei.info sub Dokumentoj > Statuto kaj Regularoj.

Voĉdono Komitata 1-2012, finiĝinta en la 23a de februaro 2012.

La komitato akceptis 15 modifetojn al la Interna Regularo de ILEI.

Dokumentoj kiu elstarigas la modifojn, kaj la nuntempe valida Interna Regularo troveblas sub Dokumentoj > Statuto kaj Regularoj:

Voĉdono Komitata 2-2011, finiĝinta en la 31a de oktobro 2011.

Validaj voĉoj ricevitaj: 36

- | | |
|-----------------------------------|-------------------------|
| 1.1 protokolo kopenhaga, sesio 1. | JES 34 NE 0 SINDETENO 2 |
| 1.2 protokolo kopenhaga, sesio 2. | JES 34 NE 0 SINDETENO 2 |
| 1.3 protokolo kopenhaga, sesio 3 | JES 33 NE 0 SINDETENO 3 |
| 2.1 statutmodifo ĉe 7.2.7 | JES 35 NE 0 SINDETENO 1 |
| 2.2 statutmodifo ĉe 7.2.8 | JES 34 NE 0 SINDETENO 2 |

Voĉdono Komitata 1-2011 de la 17a de majo ĝis la 20a de junio.

1. La komitato akceptis malgrandan modifon al la Regularo pri Honoraj Membroj, por ebligi la honorigon de forpasintoj. Akceptita per 21 poraj voĉoj, unu kontraŭ kaj neniuj sindetenoj. La kontraŭa voĉo rilatis al nur unu el la du proponitaj modifoj.
2. La tri-jara mandato de la Elekto-Komisiono venu al fino en la komitat-kunsidoj okazigitaj unu jaron pli frue ol la lauplanaj estrarelektoj. Akceptita per 21 poraj voĉoj, neniuj kontraŭ kaj unu nedeklarita– sekve la komitato nomumis en Kopenhago elekto-komisionon por ofici de 2011 ĝis 2014.

Resume: ekde la starigo de reta voĉdonado, okazis en la daŭro de 15 monatoj 5 voĉdonsesioj, en kiuj la komitato voĉdonis pri 26 unuopaj proponoj. Ĉiuj krom unu temis pri JES/NE elektoj, el kiuj ĉiuj estis akceptitaj. Ĉiu voĉdono plenumis la kvorumajn postulojn.

Deklaras la 3an de julio, 2012, sekretario Trezoro kaj prezidanto Stefan.